Tove JANSSON (1914 – 2001) estas la fama finna verkistino, aŭtorino i.a. de multaj rakontoj pri la fabelaj, skandinavaj troloj, kiuj nomiĝas ĉe ŝi Mumin-troloj kaj formas la tutan Mumin-familion. Unu el tiuj ĉarmaj tekstoj estas dediĉita al Vigilio kun abieto kaj aliaj tradiciaj moroj specife pritraktitaj, ĉar la trola familio ilin ne konas, havante de ĉiam kutimon tradormi la tutan vintron. Subite hazarde ili vekiĝas en la momento, kiam ĉiuj loĝantoj de la Mumin-valo rapide kaj nervoze prepariĝas al io, kio ŝajnas al la Mumin-familio venanta danĝero.

Tove Jansson - La abieto

[fragmentoj]

Preterpasis ilin onklino de Faŭkulo tirante piceon sur sledeto. – Do vi vekiĝis? Nu, finfine – ŝi diris indiferente. Vi strebu havi abieton antaŭ ol pli malheliĝos. – Sed pro kio? – komencis Mumin-paĉjo. – Mi nun ne havas tempon! – ekkriis la onklino de Faŭkulo tra la brako kaj startis pluen. – Antaŭ ol pli malheliĝos – ekflustris Fraŭlino Flagrino. – Ŝi diris: antaŭ ol pli malheliĝos. Do la danĝero venos hodiaŭ vespere. – Evidente oni devas havi la abieton, por almenaŭ ie sukcesi – cerbumis la Mumin-paĉjo. – Nenion mi komprenas. [...] Hejme Mumin-panjo forbalais neĝon de la verando, preparis la help-zonojn kaj aspirinon, pafilon de Paĉjo kaj varmajn kompresojn. Ĉar nenion oni povas scii. Sur la rando de la kanapo sidis malgranda, arbara estaĵeto kaj trinkis teon. Ĝi sidis antaŭe en la neĝo, sub verando kaj aspektis tiom mizere, ke Panjo invitis ĝin hejmen. – Jen la abieto – ekdiris Paĉjo. – Se ni nur sciu al kio ĝi devas servi.Gapsino asertas, ke oni devas ĝin vesti. – Tiom grandan veston ni ne posedas – diris Panjo zorgeme. – Pri kio ŝi povis pensi? – Kiel bela abieto – ekkriis malgranda, arbara estaĵo. [...] – Kaj eble vi scias kiel oni vestas la abieton? – demandis Muminulo. La arbara estaĵo ekruĝiĝis impete kaj ekflustris: – Per belaj objektoj. La plej bele kiel nur oni scipovas. Tiel mi aŭdis. [...] – Dum momento vi mutu kaj permesu al mi ekpensi – diris Paĉjo. – Se abieto devas esti ornamita, kaj plej bele, do verŝajne ne pro tio, ke ni kaŝu ni en ĝi kontraŭ iu danĝero, sed eble tial, por pli prefere elpeti ĝian pardonon. Mi komencas kompreni pri kio ĉi tie temas. Ili do tuj forportis abieton antaŭ la domon kaj fiksis ĝin forte en la neĝo. Poste ili komencis vesti ĝin de supro ĝis subo per ĉiuj belaj aĵoj, kiujn ili nur havis. Ili ornamis ĝin per konkoj, kiuj somere ornamadis bedojn de floroj kaj per la perla kolio de Fraŭlino Flagrino. Ili deprenis la kristalajn pendaĵojn de lustro en la salono kaj ekpendigis ilin sur la branĉoj, kaj sur la pinto ili fiksis la silkan rozon, kiun Panjo ricevis de la Paĉjo. Ĉiuj alportis ĉion, kion havis la plej belan por elpeti malkompreneblajn fortojn de la vintro. Kiam la abieto estas jam preta, denove preterpasis ilin onklino de Faŭkulo, ŝi, se tio ĝenerale eblis, rapidis ankoraŭ pli. – Rigardu nian abieton! – ekkriis Muminulo. – Io simila! – ekkriis onklino de Faŭkulo. – Vi ĉiam estis strangaj. Nu, sed mi rapidas ... Mi devas pretigi manĝaĵon pro Vigilio. – Manĝaĵon? – ripetis Muminulo konsternite. – Ĝi manĝas? Sed la onklino jam ne aŭskultis. – Vi pensas, ke vi sukcesos sen la manĝo? – ŝi diris malpacience kaj startis plue tra la deklivo. Panjo moviĝis en la kuirejo dum la tuta posttagmezo. Kaj antaŭ krepusko la manĝaĵo por Vigilio estis preta kaj staris en malgrandaj tasoj ĉirkaŭ la abio. Estis tie la frukta suko kaj acida lakto kaj bakaĵo kun nigraj beroj kaj grogo kaj diversaj aliaj bongustaj aĵoj, kiujn Mumin-familio ŝatis. – Ĉu vi pensas, ke Vigilio estas tre malsata? – demandis la Panjo malkviete. – Verŝajne ne pli ol mi – diris la Paĉjo per sopiranta voĉo. Li sidis en la neĝo kaj frostis volvita per la kovrilo ĝis la oreloj. Sed malgrandaj estaĵoj devas ĉiam esti tre, tre ĝentilaj por grandaj fortoj de la naturo. Malalte, en la valo, en ĉiuj fenestroj komencis ekbruliĝi lumoj, [...] flagrantaj flamoj de kandeloj kuris rapide tra neĝblovaĵoj. Muminulo rigardis demande la Paĉjon. – Jes – diris Mumin-paĉjo kaj jesis per la kapo. – Je ĉia kazo. Tiam Muminulo eniris domon kaj kolektis ĉiujn kandelojn, kiujn li povis trovi. Poste li fiksis ilin ĉirkaŭ la abieto kaj singardeme ekbrulis unu post la alia, ĝis ĉiuj ekflamis, por elpeti malhelon kaj Vigilion. Malrapide en la valo fariĝis la kompleta silento: certe ĉiuj revenis al siaj hejmoj kaj sidis atendante danĝeron, kiu devis veni. Nur la unusola ombro vagis ankoraŭ inter arboj – li estis Faŭ- kulo. [...] – Donacoj! – Eble mi freneziĝos de tio ĉi – eksplodis Faŭkulo. – Pli kaj pli da donacoj okaze de ĉiu Vigilio! [...] – Atendu! – ekvokis Muminulo. –

Klarigu al mi! [...] Sed Faŭkulo malaperis en tenebro, simile kiel ĉiuj aliaj, kiuj hastis kaj ekscitiĝis, ĉar alvenas Vigilio. Tiam la Mumin-familio kviete aliris al la domo, por serĉi donacojn. Paĉjo elektis sian la plej bonan voblilon por ezokoj, kiu estis en tre bela skatolo, kaj sur ĝia kovrilo skribis: "Por Vigilio", post kio li metis ĝin sur la neĝon. Fraŭlino Flagrino detiris sian ringon de la piedfingro kaj kun la profunda ĝemo envolvis ĝin en silkpaperon. Kaj la Panjo apertis sian la plej sekretan tirkeston kaj elprenis de ĝi libron kun buntaj bildetoj, unusolan libron kun buntaj bildetoj en la tuta valo. [...] Post kio ĉiuj komune eksidis sur la neĝo kaj atendis katastrofon. La tempo pasadis, sed nenio okazis. Nur malgranda, arbara estaĵeto venigis ĉiujn siajn parencojn, kaj ĉiuj estis egale malgrandaj, grizaj, povraj kaj frostiĝintaj. – Agrablan Vigilion! – ekflustris la arbara estaĵeto malkuraĝe. – Vi estas la unua, kiu opinias, ke Vigilio povas esti agrabla – respondis Paĉjo. – Ĉu vi entute ne timas, kio okazos, kiam ĝi vere alvenos? – Ja ĝi jam estas – ekflustris la arbara estaĵeto kaj eksidis sur la neĝo kun siaj parencoj. – Ĉu oni povas rigardi? Vi havas tiel belegan abieton. – Kaj tiom da manĝaĵo – aldonis unu el kuzoj per ravi- ĝinta voĉo. [...] – Kaj donacojn – aldonis la alia parenco. Dum la tuta mia vivo mi revis por rigardi tion de proksime – diris la arbara estaĵeto kaj ekĝemis. Ekregis la kompleta silento. Kandeloj bruliĝis per la senmova flamo inter la tenera nokto, kaj malgranda estaĵeto kaj ĝiaj parencoj sidis senmove. Oni sentis, kiel ili admiras kaj sopiras, oni sentis tion pli kaj pli forte, ĝis finfine la Panjo proksimiĝis iome al la Paĉjo kaj flustris: "Ĉu vi ne opinias ... – Jes, sed se ... – ekhezitis la Paĉjo. – Tamen – diris Muminulo. – Se Vigilio ekkoleros, eble ni povos kaŝi nin sur verando. Poste li turnis sin al la arbara estaĵeto kaj diris: – Bonvolu , ĉio tio apartenas al vi. La arbara estaĵeto ne povis ekkredi al la propraj oreloj. Singarde ĝi alproksimiĝis al la abieto kaj post ĝi ĉiuj ĝiaj parencoj kaj amikoj, kaj la hararo skuis al ili pro la kortuŝo. Neniam ankoraŭ ili havis la propran abieton. – Nun tamen la plej bone estos forkuri – diris Mumin-paĉjo malkviete. Ili alpaŝis rapide sur verandon kaj kaŝis sin sub la tablon. Sed nenio okazis. Post momento ili timeme ekrigardis tra la fenestro. Malgrandaj arbaraj estaĵetoj sur la libera aero manĝis, trinkis, malfermadis paketojn kun donacoj kaj amuzis kiel ankoraŭ neniam dum la vivo. Finfine ili surgrimpis la abieton kaj fiksis flamantajn kandelojn ĉie, sur la branĉoj. – Sed sur la pinto tamen povus esti granda stelo – diris onklo de la arbara estaĵo. – Tiel vi opinias? – respondis la estaĵeto rigardante pensige la ruĝan, silkan rozon de Mumin-panjo. – Kia diferenco, se kaj tiel oni scias pri kio temas. – Rozo estus stelo? – ekflustris la Panjo. – Ja tio ne eblas! Ili rigardis supren, sur la ĉielon, foran kaj nigran, sed nekredeble plenan de steloj, milfoje pli multaj ol somere. Kaj la plej granda el ili pendis rekte super pinto de ilia abieto. – Mi estas iome dormema – diris Mumin-panjo. – Kaj mi ne havas forton mediti pri tio, kion ĉio ĉi signifas. Sed ŝajnas, ke ĉio bonfartas. – Ĉiukaze mi jam ne timas Vigilion – diris Muminulo. – Faŭkulo kaj Gapsino kaj onklino de Faŭkulo devis tion ĉion malbone kompreni. Poste [...] ili eniris la domon, por dormi plu atendante la printempon.

tradukis Lidia Ligęza

fonto:

http://esperantujo.w.interiowo.pl/apudvistulabulteno/ab92013a.pdf